# KATALUNA ESPERANTISTO

DUMONATA GAZETO

Organo de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
kaj de la INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ




SEPTEMBRO-OKTOBRO 1930 N-RO 173

# PRIMER MANUAL

DE LA

## Llengua Auxiliar Internacional

# ESPERANTO

Editat per la FEDERACIÓ ESPERANTISTA CATALANA
Duran i Bas, 8 - Barcelona

PREU: 25 cèntims – Un centenar: 20 pessetes

# NOVAJ AMAJ POEMOJ

DE

## JAUME GRAU CASAS, L. K.

PREZO: UNU PESETO

TURNO VIN AL S-RO **JAUME GRAU CASAS**
DIPUTACIÓ, 50 – BARCELONA

# KATALUNA ESPERANTISTO

ORGANO DE LA **KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO**
KAJ DE LA **INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ**

**ADRESO: Duran i Bas, 8 - BARCELONA**

| JARABONO: | DIREKTORO: |
| --- | --- |
| Enlande: 5 pesetoj<br>Eksterlande: 6 pesetoj | JAUME GRAU CASAS, L.K. |


## GAIETA BALSELLS

En lasta Septembro mortis la konata samideano Gaietà Balsells, kiu estis Kasisto de la V^a^ Universala Kongreso en Barcelona, Prezidanto de la "Kataluna Esperantista Federacio" dum la jaroj de la Eŭropa milito, kaj ĉefa subtenanto de la tiama "Barcelona Hejmo" de la esperantistoj.

Li ne sole plenumis zorgeme kaj plej sindone siajn postenojn, sed anonime subtenis gravajn propagandojn por Esperanto.

Pro siaj eksterordinaraj afableco kaj modesteco, li meritis ĉies estimon kaj estis respektplene akceptata de ĉiuj katalunaj esperantistoj.

Li mortis sepdekjara kaj ankoraŭ en siaj lastaj jaroj li forte interesiĝis pri la sorto de Esperanto.

Al lia nevino, la eminenta muzikprofesorino F-ino Onia Farga, kaj ceteraj familianoj ni esprimas nian plej sinceran kondolencon.

LA KOMITATO DE K. E. F.

## REAPERO DE "LITERATURA MONDO"

Ni ĝojas transskribi la alvokon de niaj hungaraj amikoj al la esperantistaro:

La "Literatura Mondo", la sola literatura kaj arta revuo de la postmilita Esperantujo, antaŭ kvin jaroj, post kvarjara glora ekzistado, devis ĉesigi sian vivon.

Nun ni anoncas ĝian baldaŭan renaskiĝon.

Kiam la redaktoroj nun ree surprenas la penan taskon de la redaktado, ili sentas, ke ili plenumas kvazaŭ devon. Dum tiu kvinjara paŭzo nenie aperis simila revuo, kaj *tia revuo devas ekzisti.* Esperanto nepre bezonas literaturan evoluon kaj tion ebligas sole literatura revuo.

Per ĉi tio ni diris ankaŭ niajn du celojn ĉefajn.

1. Evoluigi la literaturon kaj per tio ankaŭ la literaturan lingvon Esperantan. Per la zorga kontrolo de la publikotaj artikoloj certigi por la legantoj revuon, kies stilo estas pura, klasika kaj modela. Per la zorga elekto de interesa kaj valora legaĵo familiarigi la esperantan beletristikon al la esperanta publiko kaj per la prezento de ĉiam freŝa kaj multflanka materialo ebligi en la grupoj viglan kaj altiran literaturan vivon. Montri la artajn kapablojn de nia lingvo ankaŭ al rondoj starantaj ekster Esperanto.

2. Ekparoligi la esperantajn verkistojn, kies ne malgranda parto nevole silentas pro lokmanko en la esperantaj gazetoj. Malkovri, instigi kaj eduki junajn verkistojn: novan armeon literaturan.

Oni devas rekoni, ke ĉio estas ekstreme grava por nia lingvo. La lingvo ne konsistas nur el vortoj, same kiel la mozaikbildo ne konsistas nur el ŝtonoj. Krom ili, kaj antaŭ ili, devas enesti spirito. Arto, literaturo ĝin donas. Tiun ĉi fermenton bezonas eĉ la naturaj lingvoj: jen kial oferas tiom multe la malgrandaj nacioj por sia literaturo, kiu ĉe ili ne estas sole amuzilo, sed kvazaŭ viv-garantio. Ni volas pligrandigi ĉi tiun vivgarantion per nia revuo, por ĝi do devas oferi ĉiu esperantisto, eĉ se li ne malkovris en si ĝis nun ian specialan entuziasmon por poemoj kaj romanoj, precipe Esperantaj.

Sed ne opiniu, ke la "Literatura Mondo" volas vivi sole el la almozoj de la entuziasmo, kaj nenion ĝi donos interŝanĝe. Nia klopodo ja estas: doni. Nia rubriko: "Mondliteratura Observo" orientos pri vivo kaj verko de eminentaj naciaj verkistoj, pri la ĉefaj okazaĵoj de la mondliteraturo, en multkoloraj artikoloj. Nia rubriko: "Arto kaj Artistoj" pritraktos la grandajn verkojn de la krea arto. Niaj recenzoj okupiĝos konscience kaj detale pri ĉiu nova Esperanta libro, donante tiun valormezurantan kritikon, kiu estas unu el la plej gravaj premisoj de la sana literatura evoluo. Per nia revuo oni povos ekkoni la grandajn verkistojn de la malgrandaj nacioj, por kio oni apenaŭ havas alie okazon.

Specialan atenton ni dediĉos al la literaturoj de la malproksima Oriento kaj ankaŭ al ekzotikaj literaturoj.

Pri la plenumo de ĉi tiu programo kaj pri la alta nivelo de la revuo garantias la nomoj de la ĉefredaktoroj:

*JULIO BAGHY kaj KOLOMANO KALOCSAY*

kiuj brile redaktis la revuon ankaŭ en ĝia unua periodo. Niaj redaktoroj estas *Karlo Bodó* kaj *Francisko Szilágyi* la talentaj tradukistoj, ĉijare laŭritaj de nia Akademio. Por konstanta kunlaboro ni varbis la plej brilajn nomojn de nia literaturo.

La revuo estos monata; ĝi estos ilustrita, ĝia aspekto estos same bela, kiel en la unua periodo. En la amplekso de dekses paĝoj, *la vivo de la revuo estas nepre garantiata por jaroj.* Sed nia granda deziro estas pliampleksigi ĝin. Tio cetere dependas de la nombro de la abonantoj. Do, niaj abonantoj, propagandante por la revuo, laboras en sia propra intereso.

*La gazeto estos 16-24 paĝa en formato de 24 × 32 cm. La unua numero aperos 1-an de januaro 1931. Abonprezo:* Tuta jaro P. 10'—. Vian subtenon esperas kaj atendas: LITERATURA MONDO, MONATA LITERATURA KAJ ARTA GAZETO, Redakcio kaj Administracio: Bleier Vilmos, Budapest. IX., BORAROS-TER 6., IV. 11., HUNGARUJO.

## DUA ELDONO DE "KATALUNA ANTOLOGIO"

La peza laboro pri maŝinkompostado plene marŝadas. Estas jam kompostitaj pli ol 320 paĝoj, kaj tuj komenciĝos la presado.

Espereble, la verko aperos en decembro, okaze de la Festo de la Libro aranĝota de la Barcelonaj esperantistoj.

## MONDONACOJ POR "KATALUNA ESPERANTISTO"

| | | |
|---|---|---|
| Narcís Bofill | Pesetoj | 25 |
| Delfí Dalmau . | " | 25 |
| Antoni Massana | | 15 |
| Ramón Soler | | 15 |
| Fernando Soler Valls | | 5 |

## LA ELSORĈIGO, de Pierre Loti

*(Daŭrigo)*

Kaj neniam ĝis tiu grado ŝi sentis sin tiel mallibera kaj ribelema, avida de sendependeco, de spaco, de vojaĝoj tra la nekonata mondo... Unu paŝon al tiuj fenestroj, kie ŝi ofte klinis sin por rigardi eksteren—sed ne, tie estis tiuj lignaj vergetoj kaj feraj kradoj kiuj incitegis ŝin. Ŝi turnis sin al duonmalfermita pordo, per piedbato pelante la trenaĵon de la edziniĝa robo etendata sur la luksa tapiŝo—la pordo de ŝia tualetejo, ĉio marmore blanka, pli vasta ol la ĉambro, kun nekradumitaj aperturoj, tre larĝaj, rigardantaj la ĝardenon kun la centjaraj platanoj. Ĉiam kun sia letero malfaldita, ŝi kliniĝis al unu el tiuj fenestroj, por vidi liberan ĉielon, arbojn, la belecon de la unuaj rozoj, almeti siajn vangojn al la kareso de la aero, de la suno... Kaj tamen, kiaj muregoj ĉirkaŭ la ĝardeno! Kial tiuj grandaj muroj kvazaŭ tiuj konstruataj ĉirkaŭ la korto de malliberejoj? De loko al loko, murapogiloj por subteni ilin, tiel senmezure altaj ili estas: ilia alteco estas kalkulita por tio ke, el la plej altaj najbaraj domoj, neniam iu povu observi kiu promenas en la fermita ĝardeno...

Malgraŭ la malgajeco de tiu enfermo, oni amis tiun ĝardenon, ĉar ĝi estis tre malnova, kun musko kaj likenoj sur la ŝtonoj, ĉar ĝi havis aleojn herbe invaditajn inter la buksaj borderoj, akvoŝprucilon en marmora baseno laŭ antikva modo, kaj kiosketon tute difektitan de la tempo, por revadi en la ombro sub la platanoj tuberaj, torditaj, plenaj de birdonestoj. Ĉion ĉi ĝi havis, tiu alitempa ĝardeno, precipe ĝi posedis kvazaŭ nostalgian kaj mildan animon, animon iom post iom al ĝi naskiĝintan, plensaturitan de nostalgioj de junaj enŝlositaj virinoj, de nostalgioj de junaj belulinoj dolĉe malliberaj.

Tiun matenon, kvar aŭ kvin viroj—negroj kun senbarbaj vizaĝoj—tie troviĝis senjakaj, kaj laboris al preparoj por la granda morgaŭa tago, unu etendante vualon inter branĉoj, alia sternante surplanke admirindajn aziajn tapiŝojn. Ekvidinte la junulinon tie supre, ili adresis al ŝi, post malgrandaj aludoplenaj okulsignoj, santempe familiaran kaj respektan saluton, kiun ŝi klopodis redoni kun rideto gaja, neniel timigita de iliaj rigardoj. Sed subite ŝi retiriĝis kun timo, pro juna kamparano kun blondaj lipharoj, veninta por alporti korbegojn da floroj, kaj preskaŭ ekvidinta ŝian vizaĝon...

La letero! Ŝi tenis en la manoj leteron de Andreo Lhéry, veran leteron. Momente tio ĉi estingis ĉion. Antaŭ unu semajno, ŝi plenumis la gravan malsaĝaĵon skribi al li, malserenigite de la teruro de tiu edziniĝo, decidita jam por morgaŭ. Kvar paĝoj da

naivaj konfidencioj, kiuj ŝajnis al ŝi teruraĵoj, kaj, kiel fino, la peto, la alsopiro de urĝa respondo al pruntnomo en restanta poŝto. Tuj, pro timo heziti en pripensado, ŝi ekspedis tion, iom hazarde, pro manko de ĝusta adreso, kun la kunkulpeco kaj perado de sia malnova instruistino (Fraŭlino Esther Bonneau, Bonneau de Saint-Miron, se plaĉas al vi, agregaciulo en la Universitato, oficiro de Publika Instruado), tiu kiu instruis al ŝi la francan lingvon, eĉ aldonante, por amuzo, en la fino de ŝiaj kursoj, iom da ĵargono kolektita en la libroj de Gyp.

Kaj ĝi atingis sian celon, tiu vekrio de junulino, kaj jen la romanverkisto respondis, kun eble nuanco de dubo kaj ŝerco, sed fine ĝentile: letero kiu povas esti montrata al la plej mokemaj el ŝiaj amikinoj kaj kiu ĵaluzigos ilin... Tiam, tute subite, venis al ŝi la incito ĝin legi al siaj kuzinoj (por ŝi, kvazaŭ fratinoj), kiuj estis deklarintaj ke li ja ne respondos. Ĝi estis tute proksima, ilia domo, en la sama fiera kaj soleca kvartalo; ŝi iros, do, en matenvesto, ne perdante tempon en tualeto; kaj tuj ŝi vokis kun ordonanta malvigleco de infano parolanta al maljuna servistino, al mamnutristino "Dadi" (1). Poste ankoraŭ kaj pli vigle: "Dadi!", alkutimiĝinte sendube al tio ke oni estu ĉiam tie, preta al ŝiaj kapricoj, kaj, ĉar la dadi ne venis, ŝi tuŝis per fingro elektran sonorigilon.

Fine aperis tiu dadi, pli neatendita ankoraŭ en tiu ĉi ĉambro ol la Korana verso brodita per oraj literoj super la lito: tute nigra vizaĝo, la kapo vindita per vualo ornamita per arĝentaj fadenoj, etiopia sklavino nomata Kondja-Gul (Rozburĝono). Kaj la junulino parolis al ŝi per lingvo malproksima, lingvo el Azio, kiu mirigis sendube la tapetojn, la meblojn kaj librojn.

—Kondja-Gul, vi neniam estas tie ĉi!

Sed tio estis dirita per malvigla kaj afabla tono, kiu tre multe malgravigis la riproĉon. Riproĉo tamen senbaza, ĉar kontraŭe Kondja-Gul estis ĉiam tie, eĉ tro ofte, kvazaŭ tro fidela hundo, kaj la junulino plej ofte suferis pro tiu kutimo el sia lando kiu volas ke neniam havu la pordo riglilon, ke la domservistinoj eniru ĉiam kvazaŭ en propran hejmon, ke neniam oni estu certa pri momento da soleco. Kondja-Gul, piedpinte, jam estis veninta eĉ dudek fojojn tiun ĉi matenon por konstati la vekiĝon de sia juna mastrino. Kaj kiel ŝi estis tentata estingi tiun kandelon ĉiam ankoraŭ brulantan. Sed jen, ĝi staris sur tiu skribotablo kie malpermesate estis al ŝi iam meti manon, kiu ŝajnis al ŝi plena de danĝeraj misteroj, kaj ŝi timis, estingante tiun flameton, interrompi eble ian sorĉon...

---

(1) "Dadi", amika alnomo, uzata por maljunaj servistinoj aŭ sklavinoj kun la tempo fariĝintaj kvazaŭ familianoj.

—Kondja-Gul, tuj mian *Tcharcfaf-on* (1)! Mi bezonas iri al miaj kuzinoj.

Kaj Kondja-Gul ekvindis la infanon per nigraj vualoj. Nigra, la jupo kiun ŝi metis al ŝi sur la matenvesto de la bona tajloro: nigra la longa pelerino kiun ŝi ĵetis sur la ŝultrojn kaj sur la kapon kvazaŭ kapuĉo; nigra, la densa vualo, retenata ĉe la kapuĉo per pingloj, kiun ŝi faligis ĝis sub la vizaĝo por kaŝi ĝin kvazaŭ per monaĥa survesto. Dum siaj iroj kaj reiroj por tiel envolvi la junulinon, ŝi diris vortojn en azia lingvo, kvazaŭ ŝi parolus al si mem aŭ kantus al si iun kanton infanan aŭ lularion, kvazaŭ tute ne atentante pri la doloro de la fianĉineto:

—Li estas blonda, li estas bela, la juna bejo kiu venos morgaŭ preni mian bonan mastrinon. En la bela palaco, kien li alkondukos nin ambaŭ, ho! kiel ni estos kontentaj!

—Silentu, dadi, dek fojojn mi malpermesis ke oni parolu al mi pri tio!

Kaj, tuj post momento.

—Dadi, vi estis tie, vi aŭdis ja lian voĉon kiam li venis paroli al mia patro. Do, diru al mi, kiel ĝi estas, la voĉo de la bejo? Ĉu iom dolĉa?

—Dolĉa kiel la muziko de via piano, kiel tiu kiun vi faras per via maldekstra mano, vi komprenas, kiam ĝi glitas al la ekstremo kie ĝi finiĝas... Dolĉa kiel tio!... Ho! kiel li estas blonda kaj kiel li estas bela, la juna bejo.

—Nu, des pli bone! — interrompis la junulino per franca lingvo, kun akcento de preskaŭ tute parizana mokemo.

Kaj ŝi daŭrigis per azia lingvo:

—Vi scias, ĉu mia avino leviĝis?

—Ne, la sinjorino diris ke ŝi leviĝos malfrue, por esti pli bela morgaŭ.

—Do, kiam ŝi vekiĝos, oni diros al ŝi ke ni estas ĉe miaj kuzinoj. Avertu la maljunan Izmaelon ke li akompanu min; vin kaj lin, ambaŭ mi kondukos kun mi.

Tamen fraŭlino Esther Bonneau (de Saint-Miron), supre en sia ĉambro, — malnova ĉambro el la tempo kiam ŝi loĝis tie ĉi kaj kiun ŝi ĵus reprenis por ĉeesti la morgaŭan solenaĵon; — fraŭlino Esther Bonneau sentis konsciencan malkvietecon. Kompreneble ne ŝi enkondukis sur la blanke lakitan skribotablon la verkon el Kant, nek tiun el Nietzsche, eĉ ne tiun el Baudelaire; antaŭ dek-ok monatoj kiam oni juĝis finita la edukadon de la junulino, ŝi devis instaliĝi ĉe alia paŝao, por instrui liajn filinetojn; nur tiam ŝia unua lernantino tiel liberiĝis koncerne legaĵojn, pro manko de persono kontrolanta ŝian fantazion. Tute egale, ŝi, la instruistino, sentis sin iom responda de la malregula ekflugo de tiu juna animo. Kaj an-

---

(1) Kaŝantaj vualoj por la strato.

kaŭ, tiu korespondado kun Andreo Lhéry, kiun ŝi helpadis, kien ĝi alkondukos? Du estaĵoj ja, kiuj neniam vidos sin unu la alian: pri tio almenaŭ oni poviş esti tute certa; la moroj kaj la kradoj respondas por tio... Sed tamen...

Kiam ŝi fine remalsuprenvenis, ŝi troviĝis antaŭ personeto aranĝita kvazaŭ nigra fantomo por la strato, kun mieno maltrankvila, preta eliri:

—Kaj kien vi iras, mia amikineto?

—Al miaj kuzinoj, montri al ili tion. (Tio, estis la letero.) Vi venas, vi ankaŭ, kompreneble. Ni tie legos ĝin kune. Nu, *ni trotu!*

—Al viaj kuzinoj? Jen!... Mi iras meti mian vualon kaj mian ĉapelon.

—Vian ĉapelon! Do tiam ni bezonas ankoraŭ unu horon, *zut!*

—Nu, atentu, mia amikineto, atentu!...

—Atentu, kion?... Ĉu eble vi ne diras ankaŭ *zut*, vi, kiam plaĉas al vi... *Zut* por la ĉapelo, *zut* por la vualo, *zut* por la juna bejo, *zut* por la estonteco, *zut* por vivo kaj morto, por ĉio *zut!*

Fraŭlino Bonneau antaŭsentis ke larma krizo estis proksima, kaj, por alporti ŝanĝon, plektis la manojn, mallevis la kapon, kun la tradicia sinteno uzata en la teatro por tragedia pento:

—Kaj pensi, diris ŝi, ke via malfeliĉa avino pagis kaj nutradis min dum sep jaroj por simila edukado!...

La nigra fantometo, ekridegante malantaŭ sia vualo, per manmovo ĉapelumis fraŭlinon Bonneau per punto sur la haroj kaj kondukis ŝin je la talio:

—Ke mi vindu min, estas dece, leĝo ordonas... Sed vi, kiu ne estas devigata... Kaj por marŝi nur du paŝojn... Kaj en tiu kvartalo, kie neniam oni renkontas eĉ katon!...

Ili malsupreniris posalte la ŝtuparon. Kondja-Gul kaj la maljuna Izmaelo, etiopia eŭnuko, atendis malsupre por ilin akompani: —Kondja-Gul enpakita de piedoj al kapo per verda silko arĝente brodita: la eŭnuko streĉita en nigra redingoto, laŭ eŭropa modo, kiu, sen fezo, ŝajnigus lin kampara pedelo.

*(Daŭros)*

El la franca trad. Marian SOLA, L. K.

## ĈE SAMOVARO

Ĉe malnova samovaro
sidas ruso kaj hungaro.
Dum la akvo zume bolas,
la amikoj ekparolas:

"Havi landon en libero,
tamen migri tra la tero,
iri vojon, sed sencelan...
Ĉu vi konas pli kruelan?"

La hungaro ne respondas,
liaj pensoj ĝeme ondas,
viŝas larmon retenitan:
"Havi landon, sed perditan..."

Ĉe malnova samovaro
sidas ruso kaj hungaro.
Dum la akvo bolas zume,
ili ploras, ploras kune.

Julio BAGHY, L. K.

## VORA EL SAMOVAR

A la vora el samovar,
seu un rus amb un magiar.
Mentres l'aigua es mou, bullenta,
l'amic rus així es lamenta:

"Una pàtria tenir lliure,
però sempre emigrant viure,
fer camí sens cap anhel...
Sabeu cosa més cruel?"

L'hongarès no li respon,
el pensar li arruga el front.
Una llàgrima és caiguda:
"Tenir pàtria, prô perduda..."

A la vora el samovar,
seu el rus amb el magiar.
Mentres fuma el te bullent,
tots dos ploren lentament.

Trad. catalana de Jaume GRAU CASAS, L. K.

## LA PETOLAJOJ DE AMO (Ĉapitro VII)

*(Daŭrigo)*

*Lina,* hontante pro sia konfeso, sufokadis malfortajn singultojn, kiuj fluidiĝis je akvo en la okuloj. *Martí* ne sciis kiamaniere respondi, pentante esti incitinta tiun eksplodon.

—Kion mi devis fari? Kion mi devis fari?—ekkriadis *Lina* por sin senkulpigi.

Kaj subite, per rikana tono kiu perforte superis la doloron, ŝi diris:

—Jen, legu...

El biletujo, kiun ŝi portis en sia sino, ŝi eltiris leteron de la fianĉo, de ŝi trovitan en la farmodomo, tiun tagmezon, kaj ĝin prezentis al *Martí.*

—Ne, ne; dankon—li diris kun vera senintereso.

—Jam mi mem diros. Ĉiuj estas similaj. Ili ĉiam pli-malpli diras la samon.—Kaj kvazaŭ litaniante, *Lina* murmuris:—Ŝirmu vin de malvarmo je la noktiĝo. Ne trinku malvarman akvon el la fontoj ŝe tien vi alvenos ŝvita. Ne eliru nokte. Iru dormi frue. Manĝu multe, sed la fruktojn kun zorgo, precipe se ili estas nematuraj. Aŭskultu la konsilojn de *Cori,* pensu ke ŝi estas la pliaĝa fratino, kiu devas agi kiel patrino. Aliparte, ŝi ĉiam montriĝis kun pli da saĝo ol vi...

Kaj subite, ekkolerinte, ŝi ekdiris ŝanĝante la tonon:—Kial, do, li ne enamiĝis je *Cori,* la malspritulo?

Kaj poste, ridetanta, kun tiuj kavetoj sur la vangoj, ŝi aldonis:

—Ĉu vi opinias ke mi tiom bezonas zorgi pri mia bonfarto? Kvazaŭ mi ne havus sufiĉan, eĉ por ĝin vendi, bonfarton kaj ĉion, kio mankas al li?...

*Martí* restadis surprizita kaj ĉagrena.

—Do, ne edziniĝu kun li, *Lina*—li diris—. Vi estos malfeliĉa.

Aperis *Cori* ĉe la pordo de la farmodomo. Ankoraŭ ŝi estis endormema kaj malfermadis la okulojn, vunditajn de la grandega brileco de la ĉielo. La aero tremetis kun reflektoj kaj vibradoj, kvazaŭ ĝi estus removigata per batado de nevideblaj flugiloj. Tio estis la kuneco de etero kaj lumo en la plej kulmina momento de la somerpleno. Forto kaj malenergio influis la korpojn per kontraŭaj efikoj, ilin skuante per ondoj de malfortigo, kaj de ekscito. Eĉ la inerta materio, la apudvojaj rokoj, oni dirus, havas animon, dezirojn kaj voluptojn.

Ŝajnis ke *Pan,* la kornulo, estis tuj aperonta ĝoja, kronante la vinberujan monteton, kiu staris ĝuste super la vojo al la farmodomo. Anstataŭ *Pan,* aperis *Andreu,* ruĝkolora kaj juna malgraŭ sia aĝo, kun malkovrita brusto, elmontrante la fortan harplenan sinon, kun malordigita kaphararo en kiu ne estis eĉ unu

blanka haro. Maldika, nerva, muskolforta kaj krurlonga, li malsupreniradis longpaŝe, rapidege, tra la vinberejo, sekvata de sia filo, kiu estis la printempa bildo de sia patro kaj ŝajnis juna faŭnuso. Ili ambaŭ havis la vizaĝon sunbrila, kaj la okuloj, kiuj magnete sin turnis al *Lina*, brullumadis. La studento divenis sur la okuloj de la knabino, kiuj ne povis sin deteni de rigardado al ili ambaŭ, ian ravemon. La viroj sin direktis al la farmodomo, tra la vinberujaro, ne malsuprenirinte al la vojo, por eviti trairadon antaŭ *Lina* kaj *Martí*. Per salto de forta kaj rapidmova besto, ili eksaltis antaŭ la farmodomon. Ili estis irintaj trinki.

*Cori*, kiam ŝi vidis ilin alproksimiĝantajn, alkuris al *Martí* kaj *Lina*.

—Rigardu ilin. Ili estas sovaĝaj—ŝi diris.

—Ne tiom—respondis *Lina* senvole—. Ili estas tiel fortaj...

*Martí* restis unu momenton pensema. Ŝajnis al li, ke li legas klare en la spirito de *Lina*. Ŝi povas tamen esti honesta, sed ne povas sin deteni de komparado inter tiuj homoj, plenaj de vira vigleco, kaj ŝia fianĉo dika kaj sennerva. La spektaklo de tiu furiozo de pasio, kiun ŝi estis ekscitinta, same fortega en la dekkvinjara knabo kiel en la kvindekjara patro, eble igis ke ŝi ŝanceliĝu.

Kompare al ŝia fianĉo, ili devas ŝajni al ŝi viroj el alia raso. Kaj la sugestio de tiu plej aĝa filo, kiu estis sin mortiginta pro virino! Kiaj intensaj pasiemuloj tiuj *Cogull'oj!*

Li preskaŭ pardonis ŝin esti tro plezuriĝinta je iliaj krudaj deziroj.

Sed, vidante *Cori'n*, ĉiam tiel serenan kaj dignan, kvazaŭ la harmonio de ŝia korpo devenus de la ekvilibro de ŝia spirito, li ekkomprenis ke en *Lina*, kvankam ŝi estas pli alloga ol la alia fratino, estas io malklara, kio povus esti la malkvietiga elemento kiu efikis sur la *Cogull'ojn*. Ĉar neniu el ambaŭ, nek li mem, estis sentintaj inklinon al *Cori*, kiu entute estis pli bela ino ol *Lina*. Tio estis, ke la klareco de la animo de *Cori* lasis ĉiujn trankvilaj ĉirkaŭ ŝi. Ili paroladis ankoraŭ dum kelka tempo, li distrita kun siaj pensoj. Kaj *Martí* decidis, de tiu momento, sin dediĉi pli al *Cori* ol al *Lina*. Kaj li diris:

—*Cori*, se ja ni devas baldaŭ disiĝi, kial ni ne faras belan ekskurson, ĉi-tiun posttagmezon?

La du fratinoj akceptis ĝoje. Ili foriris por ioma tualeto, ĉar tion ili ne povis forlasi eĉ por supreniri la montegon kie ili estus gratvundotaj de la kardoj. Kiam ili alproksimiĝis al la farmodomo, patro kaj filo elŝteliĝis kvazaŭ hontiĝintaj, furiozaj pro kolero.

*Martí* daŭris turnante sian penson:

—Estos pli dolĉe flirti kun *Cori*—li al si diris—kaj tio estos kvazaŭ bonfaro, ĉar Lina'n ĉiuj avidas kaj al la alia neniu diras ion.

Tiam alproksimiĝis al li *Teresa*, flatema:

—Ĉu vi vidas? Ili jam cedas—ŝi diris al li—. Ili fine ekrimarkos, ke ili avidas la lunon. Tamen la plej juna, mi pensas, estis tuj falonta se vi ne estus veninta.

—Sed ŝi, ĉu ja ŝi ŝatis ilin?—diris la studento, kun intereso por vidi klare en la konduto de *Lina*.

—Ŝi ŝatis malsaĝigi ilin. Ne agante malbonon, ŝi komencis montri sin tro komplezema. Nun, ne. Nun ŝi ŝatas vin, kaj ankaŭ la pli aĝa fratino. Mi aŭdas iliajn interparoladojn. Se vi volos, vi ruzetrompos unun kaj alian. Mi helpos vin.

—Tiu ludo estas danĝera.

—Kial danĝera? Por vi, juna, ĝentila kaj libera? Vi ne povas imagi, kiel mi antaŭgustumas la ĵaluzon de miaj hejmanoj! Hieraŭ, kiam la edzo ĵetis la panon sur mian kapon, ĉu vi pensas ke mi ofendiĝis? Pro ĝojo mi preskaŭ saltis.

—Rilate vian edzon, estas indiferente. Sed estas alia, kiu suferas.

—Ĉu la knabo?

—Jes, via filo. Kaj ŝajnas al mi, ke li estas la plej enamiĝinta kaj kiun plej dolorigas mia ĉeesto.

—Pro tio estas necese fari al li krudan kuracadon. Vinagro kaj salo, sur la vundon. Eĉ fajro, se nepre. Ke li ne rezultu kiel la patro kaj la unuenaskito. Super ĉio, vi venu. Ni forlasu la du fratinojn pro nenio en la mondo. Pensu ke vi faras al mi favoron. Vi reportas al mi la gajon kaj la pacon. Tion mi petegas, je la memoro de *Jaume*. Se tiu perdiĝis, ke mi ne perdu ĉi-tiun alian...

Estis io teruriga kaj samtempe kortuŝa en la stranga peto de tiu virino, kiu konsideradis necese suferigi sian filon por resanigi lin el neebla amo.

—Ĉu vi promesas al mi veni ĉiutage, kiaj ajn estos iliaj faroj?

—Jes—diris la studento.

—Mi helpos vin en ĉio—rediris kontenta la maljunulino.

Stranga situacio, tiu de *Martí Gaia*. Ĉio lin puŝis al sama celo. La petego de la maljunulino, tiu de *Lina*, lia propra inklino por tiu-ĉi lasta, inklino kiun li intencis deklini al *Cori;* la interesega kazo de la *Cogull'oj*, ilia konduto kiu incitis lin lukti kontraŭ ili... Ĉio, ĉio postulis ke, el observanto, kia li al si proponadis esti, li ŝanĝiĝu en aganton, eble en naskanton de la okazontaĵoj kiuj ĝermis en la nerigardebla fundo de la tempo. Kiel la ventegoj formiĝas en la altega spaco, kiam la homoj ankoraŭ ne vidas la nubojn, kiuj ilin portas en sia sino, ŝvelajn kaj kvietajn.

*(Finota)*

Joan PUIG I FERRETER.

El la kataluna trad. Artur DOMÈNECH MAS.

## DIVERSAJOJ

VORTOJ DE K. DE KALOCSAY.—La konata poeto skribis al la kataluna tradukinto de "Kanto de la hundoj" kaj "Kanto de la lupoj": Kun granda ĝojo mi ricevis vian valoran sendaĵon. Bedaŭrinde, mi ne scias vian belan gepatran lingvon, tamen, per mia latin-esperanta vortotrezoro mi povis traduki al mi la versojn kaj ĝoji pri ilia forma perfekteco, belsoneco kaj fideleco. Permesu, ke mi sendu al vi miajn plej sincerajn gratulojn.

Krom mia persona ĝojo, mi sentis ankaŭ alian ĝojon, Esperantan, vidante, kiel perfekta interpretilo estas nia komuna lingvo por majstraj manoj, kiaj la viaj. Vere, neniu dirus, ke la Petoefi-poemoj ne el la originalo estas tradukitaj.

"FLANDRA ESPERANTISTO" KAJ NI.—En la numero 2, aŭgusto 1929, aperis belega poemo "Katalunoj", de Jan Van Schoor, kiu tiel ofte pruvis al ni sian simpation, kaj letero el Katalunujo, de anonima aŭtoro, titolita "Antaŭen, Flandroj!".

En la numero 11, majo 1930, aperis kataluna traduko de la poemo "Katalunoj", originale verkita de Jan Van Schoor, kaj post ĝi la jena noto de la Redakcio:

"Ni ĉi supre presis la katalunan tradukon de la poemo "Katalunoj", kiu aperis en nia numero de aŭgusto. Niaj legantoj kun intereso povos kompari la esperantan kun la kataluna teksto. Ni mem ne konas la nomon de la verkinto, sed tamen laŭ ĉi tiu vojo jam kore dankas lin pro la alsendo de lia traduko kaj aldonas niajn plej sincerajn bondezirojn por lia patrujo: la bela Katalunujo!"

Ni publike dankas niajn flandrajn amikojn. Nenecese diri al ili pri nia simpatio.

VORTOJ PRI "KATALUNA ANTOLOGIO".—Bedaŭrinde, mi ne supozis, ke vi envicigos miajn kelkajn vortojn en la recenzajn artikolojn, ĉar mi ne estus skribinta tiamaniere. Mi estus skribinta, ke la libro, kaj ĝia riĉa kaj instrua enhavo estas admirinda, ke ĝi estas la baza ŝtono de la Esperanta literaturo, kaj ke neniu alia libro ĝis nun malfermis al la Esperantistaro tian vastan horizonton. Krom tio, ĝia kompilinto kaj tradukintoj, kaj la tuta eldona komitato, faris vere patriotan agon montrante la riĉecon de sia lingvo al la tuta mondo. Milionoj da pesetoj elspezitaj por propagando ne donus tian rezulton! Persone, mi trovis konatajn verkistojn kaj verkojn, sed ankaŭ tiajn, kiujn mi verŝajne neniam legus, aŭ eble sub masko, kiu malebligus la rekonon de ilia origino. Mi do restas al vi eterne danka pro la ĝuo, kiun donis al mi la legado de via admirinda verko!—E. F. Cense, Varsovio.

## KONSERVADO DE LA VOĈO DE NIA MAJSTRO SUR GRAMOFON-DISKOJ.

La direktoro de ICK en Ĝenevo ĵus informis nin laŭjene:
"La ICK sukcese intervenis ĉe s-ro Sabadell, LK, en Barcelono pri reproduktado de la sola fonograf-cilindro, per kiu la voĉo de nia Majstro, D-ro Zamenhof, estas konservita. Ĝi delegis s-ron Gili Norta, eksprezidanto de la Kataluna Federacio, por traktado kaj esploro de la eblecoj. S-ro Sabadell, konservante rajte la cilindron kiel relikvon altvaloran, fine esprimis sian principan konsenton pri la reproduktado.

Montriĝas multaj teknikaj malfacilaĵoj, sed oni esperas ĉiujn venki. La Kataluna Esperanto-Federacio mem prenos sur sin la organizadon de la afero kaj tiucele ricevis la rajton de s-ro Sabadell.

Nuntempe, ne povas esti dirate pli. La ICK petas ĉiujn interesitojn kaj intervenintojn ne plu adresi petojn al s-ro Sabadell, kiu dum la lastaj jaroj havis multajn ĝenojn kaj malagrablaĵojn pro afero en kiu li laŭjure rajtas decidi sola.

La ICK ankoraŭ informos pri la progreso de la teknika esplorado."

La esperantistoj certe ĝojos pri la saĝa cedo de s-ro Sabadell kaj la morala sukceso de ICK en tiu ĉi afero, kiu havas altan signifon por nia movado.

## OFICIALA PARTO

S-ro Manuel Palomera kaj S-ro Josep Banet estas elektitaj Komitatanoj de la "Kataluna Esperantista Federacio". Ambaŭ estas fervoraj samideanoj, kiuj certe grave helpos al la progreso de nia organizaĵo.

* * *

Nia K. E. F. sendis oficialan dokumenton al Lia Moŝto S-ro Barono de Güell, proponantan la servojn de la Federacio por aranĝi Esperantan Oficejon, kiu plenumus organizajn laborojn koncerne la venontajn Internaciajn Olimpiadojn de 1936, eble okazontajn en la Barcelona urbo.

## REVUO DE REVUOJ

*Heroldo de Esperanto.*—Ni kopias el la bonega "Heroldo de Esperanto", Koln, numero de la 15. de novembro 1929, la jenan artikolon "Multlingveco en Sudokcidenta Eŭropo", verkitan de nia Direktoro, kiu estis represata de "Flandra Esperantisto" en la numero 11, majo 1930. Ĝi ankaŭ aperis sur "Diario da Madeira", 31. julio 1930, en portugala traduko de S-ro Gomes Freitas kaj sub la titolo: "O cosmopolitismo na Catalunha". S-ino E. F. Cense ankaŭ tradukis ĝin por apero sur pola gazeto.

"Multaj personoj kredas, ke la problemo pri multlingveco ekzistas preskaŭ nur en Mezeŭropo, kaj ke en Sudokcidenta Eŭropo la lingvaj interrilatoj estas simplaj kaj nekomplikitaj.

Nu, por Barcelonano troviĝas en strataj gazetvendejoj la jenaj publikaĵoj plurlingvaj: "La Gaceta Literaria", aperanta en Madrido, duonmonata, pri literaturo, arto kaj scienco, en lingvoj hispana, portugala kaj kataluna; "OC", aperanta en Toulouse, semajna, pri literaturo kaj politiko, en lingvoj provencala, franca kaj kataluna; "La Revue de Catalogne", aperanta en Marseille, monata, pri literaturo kaj arto, en lingvoj franca kaj kataluna; "Criterion", aperanta en Barcelono, trimonata, pri filozofio, en lingvoj kataluna kaj latina; "Ciència", aperanta en Barcelono, monata, ĉefe en lingvo kataluna kaj en aliaj latinidaj; "El Correo Catalán" kaj "El Diluvio", ĵurnaloj, en lingvoj hispana kaj kataluna; "L'Eveil Catalan", ĵurnalo, en lingvoj franca kaj kataluna; "El Día Gráfico", ĵurnalo, en hispana lingvo, kun resumoj en lingvoj franca kaj angla.

Oni devas ankaŭ mencii, ke en Katalunujo aperas ekskluzive en kataluna lingvo la jenaj semajnaj aŭ monataj gazetoj: "Revista de Catalunya", politiko; "La Nova Revista", literaturo kaj arto; "D'Ací i d'Allà", magazino; "Gaseta de les Arts", arto; "La Paraula Cristiana", religio; "Mirador", literaturo, arto kaj politiko; "L'Opinió", socialismo; "Vibracions", muziko; "Radio-Lot", radiofonio; "L'Escena Catalana", teatro; "Revista de Poesia", poezio; "Llegiu-me", por junuloj; "La Dona Catalana", por virinoj; "En Patufet", por infanoj; "Xut" kaj "La Nau dels Esports", sporto; "L'Esquella de la Torratxa", politika satiro; "Excursionisme", "Agricultura", "Economia i Finances", kaj multaj aliaj revuoj pri ĝeneralaj aferoj, aperantaj en diversaj urboj, kaj bultenoj de specialaj societoj. Aliaj similaj gazetoj aperas en Katalunujo ankaŭ en hispana lingvo.

Koncerne ĵurnalojn, el la grandaj rotativoj aperantaj en Katalunujo estas kvar nur en kataluna lingvo kaj kvin nur en lingvo hispana.

La produktado de libroj estas ankaŭ duonigita inter la kataluna kaj hispana lingvoj. Kurioze estas, ke la katalunaj eldonistoj en hispana lingvo prefere konkeris la Amerikan merkaton. En

la grandega (70 dikaj volumoj) "Enciklopedio Espasa" hispanlingva, eldonata en Barcelono, ĉiu vorto havas tradukon katalunan, portugalan, francan, italan, anglan, germanan kaj *esperantan.*

Pri spektakloj ni diru, ke nuntempe funkcias en Barcelono ses teatroj en kataluna lingvo kaj du en hispana, en la kabaredoj oni kantas ankaŭ france, en la opero ĉefe itale, kaj en la parolanta kino oni aŭdas anglan lingvon. Plie, teatraj prezentadoj france kaj itale ne estas maloftaj.

La du sendstacioj "Radio-Barcelona" kaj "Radio-Catalana" disradias hispane kaj katalune, kaj ili okazigis kursojn pri esperanta, franca, angla kaj germana lingvoj.

La "Fundació Bernat Metge", kiu eldonas la klasikajn aŭtorojn grekajn kaj latinajn en tri eldonoj: Originala kaj kataluna —Nur originala—Nur kataluna, okazigas senpagajn diversgradajn kursojn pri lingvoj latina kaj greka. Tio estas farata eksterofiĉiale, simile kiel ni esperantistoj instruas la Zamenhofan lingvon.

Ankaŭ senpage, la "Alliance Française" instruas francan lingvon; societo "Dante Alighieri" la italan; kaj en komercaj rondoj oni disvastigis la araban (vulgaran) por interrilato kun Nordafriko. Kelkaj studemuloj okupas sin pri hebreismo, kelkaj teozofiistoj ŝatas la orientan kulturon, kaj kelkaj komunistoj lernas la rusan lingvon.

Antaŭ tiom da lingvoj altirantaj la atenton de la popolamaso, ne estas strange ke eĉ multaj simpatiantoj kun la ideo de lingvo internacia ne tuj lernas Esperanton. Komprenante tion, ni ĉefe akcentu en nia propagando la allogecon de la Zamenhofa kreaĵo, kaj ne timu aserti la multrilatan superecon de nia lingvo, jam en ĝia nuna formo."

*Diari de Vich.*—Ni represas, katalunlingve, la recenzon pri nia kataluna "Ruĝa Broŝuro", aperintan la 22an de julio 1930:

*"Llengua auxiliar internacional Esperanto.—Primer Manual.—Eldona Fako de K. E. F.—Barcelona.—Preu: 25 cèntims.*

Editat per la Federació Catalana d'Esperantistes, hem rebut un llibret de modesta aparièncía, adaptació catalana del "Premier Manuel" francès, deguda a la ploma del fervent esperantista Jaume Grau Casas.

Precedeix l'opúscol una nota referent a l'Esperanto a Catalunya, en la qual es ressenya brevíssimament la tasca realitzada per la K. E. F. Segueix una concisa i raonada exposició d'*Arguments pro Esperanto.*

Entra de ple en l'estudi de la llengua internacional amb les regles per a la pronunciació i la gramàtica en forma condensadíssima, essent d'observar, com a innovació ben lloable, les notes resum extretes del contingut, que figuren al peu de cada pàgina. És de remarcar — i ben esperançador per a tots aquells que vul-

guin estudiar l'Esperanto — que tota la gramàtica està continguda en nou lliçons.

Segueix a la gramàtica un vocabulari. Acaba amb una nota relativa a l'actuació dels esperantistes arreu del món.

Hem dit aposta que aquest llibret és d'apariència modesta —32 pàgines—, però el seu contingut ens confirma la nostra dita que en el pot petit hi ha la bona confitura.

Felicitem la Federació Esperantista de Catalunya i especialment al nostre amic Sr. Grau Casas.

Es troba de venda en les principals llibreries."

## ENLANDA MOVADO

En la Grupo "Barcelona Stelo" okazos la 14. decembro, je la 10ª vespere, la Festo de l' Libro Esperantista. Estas invititaj ĉeesti ĉiuj Barcelonaj grupoj kaj ĉiuj simpatiantoj al Esperanto. Oni danke akceptos esperantaĵojn por aranĝi gravan ekspozicion. Okazos deklamoj, koncerto, propagandaj paroladoj, k. t. p. Grupa sidejo: Borrell, 253 (Kooperativo).

La Grupo "Nova Sento" havas novan sidejon: Independència, 79, Barcelona. Tre sukcesa kurso de Esperanto komenciĝis, sub la gvido de la nelacigebla profesoro S-ro Artur Domènech Mas, komitatano de K. E. F.

S-ro M. Rodellar (Diputació, 93, Barcelona), la ŝatata prezidanto de "Barcelona Stelo", prenis sur sin la taskon instrui Esperanton per korespondado. Se vi havas amikojn, kiuj ne povas ĉeesti kursojn en niaj grupoj, bonvolu indiki al ili ke la fervora samideano Rodellar helpos ilin tute senpage. La afrankelspezoj estos malgrandaj.

En Monistrol de Montserrat reorganiziĝis la Esperantista Grupo. La 10. aŭgusto la grupanoj faris ekskurson al la bela vilaĝo Pierola, trans la monto Montserrat. Tie ili vizitis Pastron Orobitg, kiu ĵetis la unuajn esperantajn semojn en Monistrol, kaj li malavare regalis la ekskursantojn. Post la tagmanĝo, ĉiuj, unu post alia, ricevis la aerbapton per simpla aviadilo, konstruita de la fervora Pastro Orobitg. Oni turnflugis super la placo de la vilaĝo.

*Telegramo de la Prezidanto de la Barcelona Ateneo.*—"La Barcelona Ateneo, ĉefasocio kultura privata de la katalunlingva popolo, honoriĝe kaj plezure aliĝas al la grandkultura kaj grandideala soleno de la nuna Universala Kongreso de Esperanto.

Ĉiam pli kaj pli fervore la Barcelona Ateneo deziras al la movado esperantista, al la interlingva egaleco kaj justeco ĝeneralan efektivigon, kaj al la Universala Oksforda Universitata Kongreso finan venkon, plenan sukceson!"

# AL IBERIAJ GESAMIDEANOJ!

De antaŭ longe mi pensas, ke grava Iberia Esperantista Revuo estus tre utila por nia movado. Ĝi povus forigi multajn antaŭjuĝojn, konigi unujn al la aliaj, informi pri la sukcesoj de Esperanto, propagandi, kaj—ne laste!—ebligi la aperon de longaj —valoraj—prozaĵoj, originalaj aŭ tradukitaj, kiuj en neniu esperanta gazeto povas trovi lokon.

Nu, mi kuraĝis entrepreni tiun laboron. En januaro 1931 aperos la unua numero de la IBERIA ESPERANTISTA REVUO, laŭ la plano, kiun vi vidos dorse. Kiuj konscias pri la graveco kaj signifo de la entrepreno, tiuj anoncu tuj, ke ili estos abonantoj.

Kun permeso de la "Kataluna Esperantista Federacio", la IBERIA ESPERANTISTA REVUO publikigos verkojn premiitajn aŭ menciitajn de la INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ, longe atendantajn ke iu kuraĝa mano montru ilin al la miriĝitaj okuloj de la esperantistaro. Oni ne imagas, kiom da valoraĵoj restas kaŝitaj.

Ne estu skeptikaj. Ne timu, ke la ŝultroj ne povos subteni tian pezon. Oferu laŭpove. Varbu helpantojn. Pensu, ke de ĉiu dependas la sukceso. Entuziasmiĝu, ĉar entuziasmo estas krea. Kaj tuj post legado de tiu ĉi folio, BONVOLU SENDI AL MI SIMPLAN POŜTKARTON, PROMESANTAN VIAN KONTRIBUON!

Kun la plej kora antaŭdanko, salutas vin

JAUME GRAU CASAS
*Membro de la "Lingva Komitato"*
*Direktoro de "Kataluna Esperantisto"*

# IBERIA ESPERANTISTA REVUO

DIPUTACIÓ, 50 - BARCELONA

REDAKTATA EN ESPERANTO

KAJ EVENTUALE EN LA KVAR IBERIAJ LINGVOJ: HISPANA, PORTUGALA, KATALUNA KAJ BASKA

DUMONATA 48 P. (16 × 22 cm.)

LITERATURO INFORMADO PROPAGANDO

DIREKTORO - ELDONANTO:

**JAUME GRAU CASAS, L. K.**

## APEROS EN JANUARO 1931

JARABONO:

POR IBERIO: 9 PESETOJ

POR ALIAJ LANDOJ: 1 DOLARO

SCIIGU TUJ VIAN ABONON!

ABONPAGON VI FAROS POST RICEVO DE LA UNUA NUMERO


UNIWERSYTECKA